



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 32** > • Eŭropo • Bukavu • Kongresoj mare, tere • Poezie < **majo 10**

## Mesaĝo por Eŭropo pri la konsultiĝo

*Mesaĝo por eŭropaj kaj landaj parlamentanoj kaj ĵurnalistoj en EU-landoj*

Malgraŭ la relative amasa civitana subteno al proponoj pri Esperanto, la finaj konkludoj de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo ne mencias ilin kaj insistas pri la kutima deklaro pri favoro al multlingveco en la kontinento kaj la samtempa invito al plifortigo de la instruado de la angla. Pro tio la eŭropa komisiono de UEA kaj EEU invitas eŭropajn esperantistojn sendi al la eŭropaj kaj landaj parlamentanoj kaj al la ĵurnalistoj mesaĝon en nacia lingvo laŭ la ideoj de la sekvaj tekstoj, kiujn vi trovas en

[https://uea.org/vikio/POR\\_PLI\\_JUSTA\\_EUROPO](https://uea.org/vikio/POR_PLI_JUSTA_EUROPO) :

Ni resumas ilin en pli konciza formo.



### **PLIBONIGITA LINGVOLERNADO POR PLI JUSTA KAJ PLI EFIKA EŬROPO**

- Efika instruado de fremdaj lingvoj per propedeŭtika uzado de facile lernebla lingvo en bazlerneja aĝo kaj
- Agnosko de Esperanto, kiel lingvo kun kulturo kreskinta de pli ol 130 jaroj, kiu estas jam parolata de civitanoj en ĉiu lando de EU.

Ni ĝojas, ke ankaŭ Esperanto estas menciita en la platforma raporto (Februaro 2022) eĉ 22 fojojn pro la multaj kaj multe subtenataj ideoj esprimitaj de la eŭropaj civitanoj pri manieroj, por konservi Eŭropon multlingva kaj tamen interkomunikanta en justa maniero. Tial estas strange, ke tio estas konsiderata en neniu el la 49 proponoj de la fina plenkunsido (en la finrezulta raporto aperas Esperanto nur en aldonaĵo rilate al unu el la naciaj civitanaj paneloj).

Estis problemoj en la transdono de la ideoj de la civitanoj al la postaj diskut-niveloj, pro kio ni insiste petas, ke en la plenumado de la decidoj oni revenu al tio, kion la civitanoj proponis kaj en nia kampo oni apliku Rekomendon 32 de Eŭropa Civitana Panelo 1 por teni Eŭropon eŭropa kaj multlingva.

Tial ni alvokas EU kuraĝigi la edukministeriojn de ĉiuj 27 EU-landoj, reprodukti la lernejan programon "Multilingual Accelerator" (vidu Proponon 23893) sub profesia pedagogia superrigardo kaj en pli granda skalo, por testi la efikecon de tiu ĉi noviga alproksimiĝo.

## Kabaredo en la hispana kongreso

"Telefona aŭtomato" de la kabaredo "Verda banano", kiun prezentis Georgo Handzlik kaj Saša Pilipović en la ĵus okazinta 80a HEK:

<https://youtu.be/DEgtZnMJLY>

mga

## Bukavu vere agadas inter infanoj

La COPROFER estas senprofita asocio de esperantistoj el Bukavu. Laborante por promocii la lingvon Esperanto. La ĉefaj agadoj de COPROFER estas la enkadriĝo de orfoj, forlasitaj infanoj, stratinfanoj kaj vundeblaj virinoj; Esperanto-trejnado kaj kreado de enspezproduktaj agadoj por vidvinoj. La agadoj de la Esperanto-trejnado daŭras en ĝusta formo danke al la subteno de la programo "ni semas", kiu estas nun prizorgata de la Afrika Komisiono nome de UEA.

La 6-an de majo la asocio COPROFER ricevis donacon de 50 dolaroj de aktiva esperantisto el Svedio respondeca kaj posedanto de la esperantista retejo "MiaVivo.net". Ĉi tiu donaco ebligis la trovon de manĝaĵoj ĉe nia orfejo inkluzive de faruno, faboj, rizo, sukero kaj panoj. Memoru, ke nia centro por orfoj kaj forlasitaj infanoj havas 100 infanojn, inkluzive de 70 orfoj kaj 30 forlasitaj infanoj. Ĉi tiuj infanoj bezonas nian kaj vian helpon.

Por la COPROFER, Moise Byamungu, prezidanto de la asocio.



## Kurso en universitato de Katalunio.

Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) proponas senpagan kurson de Esperanto al la lernantoj de la Universitato Pompeu Fabra.

La lecionoj komenciĝos en majo, kaj okazos lunde kaj merkrede. Krome, oni ricevas universitatajn kreditojn ECTS. Pliajn informojn ricevu en la sociaj retoj de KEJ.

(La Bitulteno de HEF. Nro. 80. Aprilo 2022). Sendis Ilona Koutny.

## Kursoj el Lubumbaŝo en DR Kongo

Mi gvidas du Esperanto-klubojn: unu ĉeeste kaj la alian rete per Vacapo. La antaŭa reta klubo jam baldaŭ fermiĝos, sed mi malfermis novan retan klubon por gekomencantoj, nun ni estas ĉe la kvina leciono. Ĝi havas entute 12 gelernantojn el du landoj: Kongo DR kaj Burundo. La instrulingvoj estas plejofte la svahila kaj fojfoje intermiksiĝas ankaŭ la franca, kaze ke iuj gramatikaj terminoj ŝajnas malfacile kompreneblaj svahile. Tiu ĉi klubo anstataŭiĝos per alia kiam la plimulto de la lernantoj regos la lingvon Esperanto.

Laŭritme ni iras nian vojon lernante Esperanton. Kvankam la nombro da lernantoj ne kreskas, tamen feliĉe mi eltenas kaj daŭrigas kun tiuj, kiuj jam konsentis esperantistiĝi. La urbo ja ege grandas, la atingo de pli granda publiko postulas televidan instruadon.

### MALFACILAĴOJ ALFRONTATAJ

La malfacilaĵoj daŭras la samaj, kaj rete kaj ĉeeste.

- Rete: la interreta kosto daŭre postulas ĉiusemajnan elspezadon; feliĉe mi povas solveti tiun ĉi problemon kelkfoje.
- Ĉeeste: kretoj, lernolibroj malsufiĉas seĝoj jam malmultas por gastigi pliajn gelernantojn eventuale scivolemajn, ĉar foje se lernantoj aldoniĝas ili sidas sur kanistroj aŭ ŝtonoj. Libroj tiom stimulus la lernantaran lernemon, ĉar oni povas organizi legorondojn aŭ lingvan kolokvojn.

Espoir Kasati, DR Kongo.



## Vanderbilto aktiva en Esperanto

Artikolo de Alessandra Madella pri Alice Vanderbilt Morris prezentis virinon de prestiĝa usona familio, kiu lernis Esperanton kaj fondis Internacian Helplingvan Asocion (IALA). En la unua prepar-kunveno de la asocio partoprenis ankaŭ la usona filozofo kaj pedagogo John Dewey.

## Tajvane oni konkuras

Ekde la 10a de junio ĉiun vendredon, je UTC12:00-13:00 (en Tajvano 20:00-21:00), senpaga kurso. Por aliĝi bonvolu skribi al Liru CHEN [mayliru09@gmail.com](mailto:mayliru09@gmail.com)

Jen la ligilo:

<https://us02web.zoom.us/j/83781833131>

Meeting ID: 837 8183 3131. Paskodo: esperanto

## Belartaj Konkursoj diskutataj

La sekretario de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio parolas ĝenerale pri la konkurso en la ĵus okazinta 80a HEK.

<https://youtu.be/lKDogag-3rs>

mga

## Poze dumkroze – sukcesis la surmara kongreso

Ni raportis en EKO 19 pri la planoj por tiu trilanda kongreso. Ili ja sukcesis atingi la bezonatan nombron de aliĝintoj, kaj la kongreso efektive okazis, kiel atestas la grupfoto, kiun prizorgis Peter Wraae, la prezidanto de la dana sekcio. Raportas Ann-Louise Åkerlund el Svedio:

La Tria Skandinava Kongreso de Esperanto okazis sur ŝipo inter Kopenhago kaj Oslo dum la tiel nomata Ĉielira semajnfino 27-29 de majo 2022. Kial la tria? En majo 2018 ni aranĝis la duan komunan kongreson memore al la unua tia evento antaŭ 100 jaroj, en aŭgusto 1918.

La (unua) Skandinava Kongreso de Esperanto, aranĝita de la pioniro G.H. Backman kaj prezidata de Paul Nylén, okazis en Gotenburgo. Montriĝis malfacile (multekoste) celebri la centjariĝon en la sama urbo kaj oni decidis anstataŭe elekti la pramsipon inter Kopenhago kaj Oslo, kiu ofertas taŭgajn diversgrandajn konferencajn ĉambrojn, krom tranoktadon kaj manĝojn. La kongreso fariĝis sukceso kaj Dana Esperanto-Asocio (DEA) deklaris sin preta aranĝi similan trilandan kongreson post tri jaroj.



Pro la samaj ekonomiaj kialoj ankaŭ la tria trilanda renkontiĝo okazis sur la ŝipo inter Kopenhago kaj Oslo. La programo konsistis el prelegoj, diskutoj, kunbabiladoj kaj amuza komuna vespero kun rakontoj, kantoj kaj ĉendancoj. DEA prezentis diplomon al sia longtempa kaj elstare laborema kaj multjara prezidanto de DEA Ileana Schröder kaj NEL (Norvega Esperantista Ligo) raportis ke ĝi donis diplomon al du siaj elstaraj membroj: Otto Prytz kaj Douglas Draper. La prelegoj interalie temis pri "Historio de metodoj de la instruado de fremdaj lingvoj" (Bent Jensenius), "Scienco helpe al publika bonfarto. Atingoj kaj bezonoj" (Orlando Raola), "Blinduloj en la Esperanto-movado" (Otto Prytz), "Vivmendio kaj daŭrigebla socio (Gunnar Farm) kaj "Kiel mondvojaĝi per Esperanto" (Heroo el Koreio), kaj kelkaj temoj kaŭzis viglajn diskutojn. En ambaŭ urboj lokaj esperantistoj ofertis gvidadon kaj ekskursojn kiam la ŝipo restis ĉe la kajo.

Ann-Louise Åkerlund

## Samtempe kongreso surtere en Kantabrio, Hispanio

Inter la 29a de aprilo kaj 3a de majo eblis okazigi ĉeeste la 80an Hispanan Kongreson de Esperanto, kiu devis atendi la plibonigon de la sanitaraj kondiĉoj. La loko estis la tre bela kaj monumenta urbo Comillas, en la norda regiono Kantabrio. Aliĝis ĉ. 150 homoj, eĉ se fine ne ĉiuj povis partopreni ĝin. Se vi mem ne povis ĉeesti, vi povas legi raporton pri la programeroj en [tiu ĉi artikolo](#) en La Ondo de Esperanto aŭ en jena [wikipedia artikolo](#). Ni ankaŭ filmis grandan parton de la kongreso, kaj iom post iom ni publikigos la videojn en la jutuba kanalo de HEF. Oni povas aliri ilin en [tiu ĉi video-listo](#), kie jam troviĝas kelkaj prelegoj, kantoj, kabared-skeĉoj kaj kantabraj eroj.

La sekva kongreso okazos verŝajne post unu jaro en la urbo Sevilo. Klopodante varmigi la etoson por tiu ĉi sekvanta hispana kongreso, la tre juna Gabriela intervjuis esperantistojn en Comillas kaj tion oni alŝutis en la jutuban kanalon *pikapika*, kie ŝi montras Esperanton al geamikoj. Spektu la unuan ĉapitron [tie ĉi](#), kaj ĝuu la fluan Esperanton de infano kaj de komencantoj.

Laŭ Bitbulteno, numero 81.

## Penseo 368 –paradizo poezia

Por niaj poezemaj legantoj, eblas trovi la revuon *Penseo* alkroĉita.

## Invito al danco kaj bonŝanco

Jomo regalis la anojn de la 80a Hispana Kongreso de Esperanto (Comillas 2022), per sia kanto "Ĉu vi volas danci?":  
[https://youtu.be/lf1bFnz\\_XU8](https://youtu.be/lf1bFnz_XU8)

mga

## Aliro al AMO 86 ĉi-dimanĉe

**Memorigo!!** Partoprenu rete por ĝui tri legendojn de la praloĝantoj de Oceanio: tri el Aŭstralio kaj po unu el Nov-Zelando kaj la insularo Tahiti.

Jen la alir-informo: Tempo: Junio 12, 2022 10:00-12:00 UTC (12:00-14:00 CEST)

Zoom-ligilo: <https://us02web.zoom.us/j/83077839393>

Nur de demandite: Kunven-identigilo (Meeting ID): **830 7783 9393**

Pasvorto (Passcode): la nomo de nia komuna lingvo per minuskloj

===== vortoj: 1400 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.  
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento e [prezento](#) estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.